

# Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaudon la 18-an de aŭgusto 2022 per Zoom

## Ĉeestis

Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget, Vidar Skretting, Marianne Lund.

### 1. Aprobo de la tagordo

Ni aprobis la tagordon.

### 2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 9-an de junio 2022

La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

### 3. Esperantonia

La landa kunveno taskigis la domkomisionon esplori la valoron de Esperantonia. La domkomisiono demandis makleriston, kiu aludis vendosumon de 2,5 milionoj. Post vendo de Esperantonia eblus lui oficejon en oficejaro kun aliaj asocioj, ekzemple Frivillighetshuset. Provizoraj esploroj montras, ke la kosto de tia oficejo estus inter 1300 kaj 2000 kronoj jare por 1m<sup>2</sup>, do, eble entute 20.000 jare, dum Esperantonia kostas jare pli ol 40.000. Frivillighetshuset disponigus kunvenĉambrojn por klubaj kunvenoj, sed ne por la arĥivo. Frivillighetshuset estos en la nuna ejo ĝis januaro 2025.

Bård esploras la eblecojn de eventuala luo en Frivillighetshuset post du jaroj. Vidar rigardos la lokon. Ni petos la domkomisionon havigi minimume tri pritaksojn de makleristoj, prefere skribajn, kaj pri vendo kaj pri luigo, kaj ankaŭ pri eventuala ebleco konstrui loĝejon tie. Ni opinias, ke pli aktualas vendi ol luigi, interalie pro la laboro, kiun kausus luigado. La klubo de Oslo estas kunposedanto.

### 4. Membroregistro

Lars faros konkretan proponon pri membroregistro ĝis la venonta kunveno, kaj li proponos helpi al Douglas pri la problemoj fari etikedojn.

### 5. Honoraj membroj – peto al Legaco Uhlen

La 20-an de junio estis sendita peto al Legaco Uhlen je 7500 kronoj. La estraro apogas la peton.

### 6. Vortaro

Jardar parolis kun Jørgen Bosoni, kiu konsentas pri la bezono agi kaj ekhavi superrigardon pri la projekto. Plej gravaj demandoj estas: Ĉu la proponoj de pli bonaj vortoj estas en la datumbazo? Kio pri la novaj vortoj? Kion fari por denove eki la laboron? Jardar, Jørgen, Herman kaj Kjell kunvenos dum la aŭtuno por diskuti la aferon kaj por fari strategion por antaŭenigi la laboron.

### 7. Kotizo por 2023

Douglas proponas frostigi la kotizon je 390 kronoj anstataŭ ol levi ĝin al 410. Ni konsentas.

### 8. Norvega Esperantisto

Venonta limdato – meze de septembro. Ni provu helpi al Douglas pri materialoj. Aperu nekrologo pri Ester Olsen. Ni proponas peti al Herman verki ion pri UK.

### 9. Eventualaĵoj

Kursoj – Marianne pretas fari komencan kaj konversacian kursojn. Ŝi skribos proponon pri tio al la estraro fine de aŭgusto.

### 10. Venonta estrara interkonsiliĝo

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 29-an de septembro je la 20-a horo.

Protokolis Marianne Lund